

Numero: 276.
Majo: 2015.

23-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Kiu lingvo sekvos?

Dum la historio de la homaro jam multaj lingvoj ĝuis privilegion. Suzpozeble ankaŭ prahomo ekprovis forci sian primitivan lingvon al aliaj kunuloj, kun kiuj li renkontiĝis vagante tra montoj kaj kamparoj.

Kompreneble se li estis sufiĉe forta, tiam sur la konkerita teritorio lia lingvo fariĝis la unusola komunikilo.

En la sekvaj jarcentoj, eĉ jarmiloj elformiĝis lingvoj, sed tiu ĉi perforteco restis. Kiu estis sufiĉe forta kaj influa, ties lingvo regis longtempe ĝis venis pli forta ulo kaj poste tribo, popolo.

Landoj atakis landojn, popoloj popolojn kaj kiu venkis tiu diktis sur ĉiu tereno. Tiu diris ankaŭ tion, kiu lingvo estu parolata, uzata en la sekvaj jaroj.

Ankaŭ en la lastaj jarcentoj ofte ŝanĝiĝis la favorata lingvo en Hungario.

En Karpata baseno intermiksiĝis diversaj lingvoj kaj kulturoj. Tiun ĉi teritorion intencis konkeri diversaj grandpotencoj de la tataroj ĝis la timiga Ruĝa Armeo. Ĉiufoje okazis provadoj anstataŭi la lokan lingvon per alia.

Ofte dum longtempo la lingvo kaj kulturo de la konkerinto estis devigita.

Se oni rerigardas al la forpasintaj jardekoj oni vidas diversaj lingvoj estis devigitaj instruitaj en la lernejoj.

Nun Hungario, kiel la membro de la okcidenta alianco la angla estas la unusola rekomendita lingvo kaj ĉiu ĝin volas lerni.

Sed jam estas sentebla la antaŭvento de la baldaŭa politika kaj ekonomia ŝanĝiĝo.

Laŭ mi la angla lingvo perdos sian potencon. Jam nun oni povas vidi ties signon, se oni ne estas blinda.

El la araba mondo ekiris grandaj ŝanĝiĝoj. Eŭropon inundas rifuĝintoj amase. Tiam ankaŭ ne estas menciita la ĉiniaj okazintaĵoj. Post kelkaj jaroj aŭ jardekoj Ĉinio fariĝos la unusola grandpotenco de la mondo. Eble tiam la mandarina lingvo okupos la lokon de la angla en la internacia komunikado.

Nin kaj niajn estontajn idojn atendas surprizoj. Laŭ mi devos alkitimiĝi al tio, ke la homaro necesos lerni aliajn mondlingvojn, se li deziras komprenigi sin kie ajn sur la tergloblo.

-Redaktanto-

Ĉu ni meritas Esperanton?

Kial mi demandas ĝin?

La respondo estas facila kaj simpla. Laŭ mi ankoraŭ homaro ne maturiĝis je tiu ĉi lingvo. Ni ankoraŭ ne staras sur tiu ŝtupo de la evoluo, ke ni povu kompreni la veran valoron de tiu ĉi grandioza lingvo.

D-ro Zamenhof kreis ĝin tro frue. Eble li devintus atendi almenaŭ du aŭ tri jarcentojn.

Nuntempe ofte influaj kaj inteligentaj personoj opinias pri ĝi negative, dirante: Esperanto ne povas plenumi la rolon de helplingvo, kiu povus solvi multe da lingvaj malfacilaĵoj.

Anstataŭ Esperanto oni prefere lernas iun disvastiĝintan nacian lingvon pensante, ĝi povos fariĝi vera komunikilo inter diverslingvaj homoj.

En la mondo estas granda lingvoĥaoso, kiu tre malhelpas la normalan komunikadon.

Estas kiuj asertas, tiun ĉi lingvoĥaoson povas solvi iu nacia lingvo. Do Esperanto ne estas bezonata.

Kial oni kontraŭas la zamenhofan lingvon?

La respondo ĉiam estas infaneca kaj stulteta. Onidire per Esperanto ne eblas komuniki kaj ĝi ne estas uzebla sur ĉiu tereno. Ekzemple fakliteraturo apenaŭ ekzistas en Internacia Lingvo. Male en la anglan lingvon preskaŭ ĉio estas tradukitaj kaj legeblaj.



Mi ne diskutas. Vere nun la angla lingvo estas uzata pli vaste, sed tio estas stultaĵo, ke tiaj tekstoj ne estas tradukeblaj al Esperanto.

Kiam la homaro paŝos sur tiun ŝtupon de la evoluo, ke estos komprenita la senco de tiu ĉi lingvo, tiam (se ankoraŭ Esperanto ekzistos) la diverslingvaj nacioj amase uzos ĝin kaj la nomo de la kreinto estos benata.

Bedaŭrinde nun en 2015 ni homoj estas tro primitivaj, lingvaj prauloj por ke ni komprenu la valoron de tiu ĉi bela kaj grava lingvo.

Mi nur povas esperi, ke nin sekvantaj generacioj estos pli ŝaĝaj ol ni. Ili ne forjetos tiun ĉi bonegan eblon rapide kaj facile ellerni la komunan lingvon de la homaro.

-Ŝaŝa-



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XI-a

Surprizo post surprizo. Li tute konfuziĝis kaj li ne sciis, kion fari. Johano nur staris ŝtoniĝante. Li sentis, baldaŭ freneziĝos.

Kie li estas? Ĉu tio estas sonĝo aŭ realo. Ĉio estas alia kiel li vidas. Li havis kapturiniĝon.

La muziko estis agrabla, eĉ ĝi estis tre kara por li. Kvazaŭ li jam estus aŭdinta ĝin ie. Sed li ne sciis kie.

En la brila salono li estis sola. Neniu estis tie krom li. Eble li nur sonĝas ĉion.



Li ekiris en la salono. Unue li iris al la grandaj fenestroj. El ili estis almenaŭ tri aŭ kvar. Li deziris vidi kie li estas? Bedaŭrinde la fenestroj ne estis travideblaj. Nur lia vizaĝo respeguliĝis. Vane li provadis malfermi ilin. La fenestroj estis ŝlositaj.

Subite la agrabla muziko ĉesiĝis. Sekvis longa, timiga silento.

Johano ĉirkaŭrigardis, sed li vidis nenion. Nur la muziko ĉesiĝis.

Eble se li povus eliri el la salono. Ankaŭ la pordo estis ŝlosita. Li estis enfermita.

Li jam komprenis nenion. Verdire tie ĉi pli bone esti malliberulo ol en tiu malseketa kaj obskura kelo.

Johano sidiĝis sur proksiman seĝon kaj memoris pri sia amata onklino Izabela. Kiom longe li jam ne vidis ŝin. Certe ŝi nun ĉagrenas plorante hejme. Ĉu ŝi jam sciigis la terajn parencojn pri la malapero de sia nevo, aŭ ŝi silentas esperante, ke fine Johano hejmenvenos.

Ĉu Elizabeto, tiu kara junulino, kiun li vidis lastfoje en la restoracio?

Kio okazas al li?

Kial li estas enŝlosita en tiun ĉi luksan salondon. Videble sur la muroj pendas valoraj kaj multekostaj pentraĵoj. Ankaŭ la muroj estas el oro kaj perloj. Meze estas granda diamanto, kiu ĵetas ĉielan brilon en la salono.

Kvazaŭ ĝi estus la parto de iu palaco. Sur Luno ankoraŭ li ne vidis tian konstruaĵon. Tie ĉi ĉie estis modernaj domoj kaj loĝejoj.

Li estis tute ravita. Sed nun la lukso ne interesis Johanon. Li prefere estintus ekstere promenante en tiu belega parko, kie li randevuis kun Elizabeto.

Efektive, kiu estas tiu ĉi virino? Kial lia kara onklino ne volis, ke ili renkontiĝu? Nun tiuj ĉi pensoj kirligiĝis en lia cerbo.



Li venis al Luno por pasigi lian libertempon kun sia amata onklino. Apenaŭ pasis du aŭ tri tagoj kaj al li okazis eksterordinara situacio. Similajn li vidis nur en filmoj en la televido. Ĝis nun li nur ridis pri tiaj scenoj. Li pensis, tiajn historiojn povas eltrovi nur filmistoj kaj en la reala vivo simila ne okazas. Nun propraokule li vidas kaj per sia tuta korpo sentas, ke ĝi ne estas fikcia historio. En tiu ĉi filmo li estas la ĉefrolanto.

Estus interese, se fine oni malkaŝus, ke ĉio estas filmita.

Johano nur sidis senmove sur la seĝo. Li rigardis la pinton de siaj ŝuoj.

Li atendis kaj atendis. Dank' al Dio li ne sentis malsaton kaj soifon. Laŭ li jam ekde tagoj li ne manĝis kaj trinkis.

Kio okazis? – Eble dum li dormis, iel oni nutris lin – aŭ ĉu li estas sorĉita?

Tio ĉi tre, tre torturis Johanon. De tiuj pensoj li ne povis liberiĝi.

Apenaŭ li rimarkis, kiam nevidebla pordo sur la bele ornamita muro malfermiĝis kaj enpaŝis lia onklino Izabela.

Ŝi malrapide proksimiĝis al Johano. Ŝi ridetis, sed ŝi diris nenion. Li frotis siajn okulojn kaj pro la ĝojo li eksaltis. Sed tiam tia afero okazis, pri kio li ne pensis, eĉ en la plej sekretaj sonĝoj.

(daŭrigota)



Poezio

Ĉu vi povas imagi la vivon sen poezio? Ĉar mi ne. Poemoj, versoj ĉiam ekzistos ĝis racia vivo estos sur terglobo.

Verdire en nia kureganta mondo oni ne legas poemojn aŭ nur malofte. Post la lernejaj jaroj oni apenaŭ prenas poemlibrojn en la manon. Prefere oni rigardas televidon aŭ retumas.

Estus bone, se oni ne forgesiĝus pri tio, ke ankaŭ rete oni povas legi belegajn poemojn. Fakte legi pli animagorda el libro, sed vidu, la mondo ŝanĝiĝas. Vane ni protestas, ni ne povas haltigi la disvastiĝon de la elektronikaj libroj tiel nomita „E-libro”.

Ne gravas kiel, sed ĉiutage legu poemojn. Kiu legas ĝin, tiu havos eksterordinaran travivaĵon.

Hieraŭ mi estis en grandega urbo

elrusigis Sergei PAHOMOV

Vizitis mi hieraŭ urbegon,
Tie forestas ĝuste hom'!
Anstataŭ fenestr' en ĉiu dom'
Mi vidis nure spegulegon.
Trapasis mi en stratoj multe-homaj,
La urbo plenis de la respeguloj.
Post mi ili iris kvazaŭ ombruloj
Kaj en silento aŭskultis min...
Kiam mi estis ridetanta,
La tuta urbo ridetantis.
Kaj se kapjesis mi al iuj,
Kapjesis tuj responde ĉiuj.
Do estis multaj momentoj por imagi:
La urbo vivas, deziras agi
Milionoj da personoj.
Ho, mia Di!, ne povas kredi mi,
Ke estas unu mi kaj ĉirkaŭstaras
Nur la speguloj
Sed ne uloj!
Inter ili ne eblas kvereloj...
Ili similas kvazaŭ ĝemeloj...
Sed baldaŭ mi de l'urb' foriĝis
Kaj tuj la urbo...malpleniĝis.



Lulkanto, aŭ antaŭparolo por Edvardo IVa de William BLAKE

[Mi aŭdis ĉi tiun poemeton de la famekonata angla poeto William Blake sur la kompaktdisko "Elemental" de la kanada popolkantistino Loreena McKENNITT, kaj tuj ekamis ĝin. Mi hazarde reaŭdis ĝin hodiaŭ matene, tuj post ricevo de telekopia mesaĝo pri la baldaŭna sufersorto de la homoj de Irako sendita de Husajn al-Amily, kaj la kuniĝo de tiuj du okazaĵoj instigis min, hodiaŭ posttagmeze, traduki ĝin en Esperanton. Evidente en ĝi troviĝas iom da vereco. -- Don Harlow, 2002.07.29]

Ho, ke mi havu voĉon tondran, kaj langon
por dronigi la gorĝon de milit'! Kiam la sentoj
tremas, kaj l' animon sorbas frenezeco,
kiu rezistos? Kiam l' animoj de la subpremitoj
Luktas en l' aer' furiozanta, kiu rezistos?
Kiam la trombo de kolero aperas el la Tron'
de l' Dio, kiam la kolero de mieno Lia
kunpelas la naciojn, kiu rezistos?
Kiam peko plaŭdas per flugiloj vastaj super la batal',
kaj velas, ĝojante pro la mortinundo,
kiam animoj forŝiriĝas al fajro poreterna,
kaj demonoj el Infer' ĝojadas super la mortintoj,
Ho, kiu rezistos? Ho, kiu okazigas tion?
Ho, kiu respondecos antaŭ la Dia trono?
La reĝoj kaj nobeloj de la lando kulpas!
Ĉu vi ne aŭdas, Ĉiel', ministroj viaj kulpas!



Por infanoj

Koko kaj kokino



Iam en la vasta kortobirdarejo vivis koko kaj kokino.

Dum la tuta tago ili skrapadis sur la rubejo kaj ili ĝuis la vivon.

En iu belega somera posttagmeze okazis, ke la kokino trovis tie ororingon. Ili ne sciis, kio ĝi estas. Ili ankoraŭ ne vidis tian objekton.

La kokino montris ĝin al la koko.

-Rigardu koko, kion mi trovis! Ĉu vi scias, kio ĝi estas?

Ankaŭ la koko longe rigardis la ororingon, sed ĝi estis senkonsila. En la kortobirdarejo neniam estis trovita simila. Ili jam trovis rustajn vazojn, forĵetitajn manĝilojn, forkon, kuleron, sed ororingon neniam.

Kion ili faru? Se almenaŭ ĝi estus vermo, tiam, kiel bonaj geamikoj ili dividus inter si la bongustan nutraĵon. Sed tiu ĉi flave brilanta objekto por kio estus bona?

-Ni demandu la anason! Eble ĝi estas pli saĝa ol ni ambaŭ, kaj ĝi scios, kio estas tiu ĉi ringo – proponis la kokino.

La koko konsentis kaj ili iris al la anaso.

-Kara amiko anaso, ĉu vi scias, kio ĝi estas?

La anaso longe rigardis ĝin. Kelkfoje per sia beko ĝi batadis ĝin, sed bedaŭrinde ankaŭ la anaso ne sciis.



-Iru al la sinjoro viransero! Onidire li jam estis en la korto de lernejo. Laŭ mi ĝi estas pli saĝa ol ni triope.

Ili akceptis la proponon de la anaso, kaj serĉis la viranseron en la malantaŭa parto de la korto. Ĝi ĝuste sunumis kaj rigardadis anserinojn, kiam ili alvenis.

-Kion vi deziras? – demandis ĝi kolereme. – Nun mi estas okupita. Diru rapide!

Ili diris al ĝi por kio ili venis.

La viransero longe cerbumis kaj fine ĝi gakiadis:

-Ie mi jam vidis similan. Sed kie? Mi ne scias. Lasu min pensadi! Jes, jam mi scias. Ĝi estas gefianĉa ringo. La viro donas ĝin al virino antaŭ la geedziĝo. Per ĝi li petas la manon de sia karulino.

La koko kaj kokino tre ekmiris. En la kortobirdarejo ĉiu besto sciis, ke ili amas unu la alian. Tage kaj nokte ili estas kune, kiel geamantoj. Ofte ili vidis la kokon, kiel ĝi amindumas al sia ino.

Abrupte venis la ideo. Ĉiu besto samtempe pensis same. Sed nur la koko kuraĝis diri al la ĉeestantoj.

-Mi fianĉinigos mian belegan kokineton kaj tiun ĉi bele brilantan ringon mi donacas al ĝi. Post unu semajno okazos nia geedziĝa ceremonio. Mi invitas ĉiun, kiu vivas kaj movas en la kortobirdarejo. Ankoraŭ hodiaŭ mi parolos kun la dommastrino kaj mi petos ŝin regali nin per bongustaj grenoj. La grilo muzikos por ni.



La bestoj tre ĝojis pro la bonega novaĵo kaj la bonŝanco de la koko kaj kokino.

Solene estis transdonita la ororingo al la kokino, kion ĝi singardeme metis sur la maldekstran flugilon.

Jam ili feliĉe pensis, ke ĉio estas en ordo, kiam enkuregis la kortobirdarejon la hundo Bodri. Ĝi laŭte bojis primokante la gefianĉojn:

-Tio ĉi ne estas vera gefianĉigado, ĉar mankas la alia ringo. Ankaŭ la koko devas meti sur la flugilon ororingon.

La bestoj interrigardis kaj pensis, ke Bodri pravas. Kion fari nun? Tiel ne povos okazi geedziĝa ceremonio.

La ĉeestantoj komencis disiĝi. Antaŭ ol foriri la viransero diris al la koko kaj kokino:

-Reiru al la rubejo kaj serĉu la duan ororingon. Se ĝi estos trovita, ni povos trakti pri via geedziĝo.

La gekokoj malgaje reiris al la rubejo kaj ili tage kaj nokte skrapadis por ke la ororingon ili trovu. Eble ankaŭ nun ili serĉadas tie. Se ili trovos la ringon, ankaŭ mi daŭrigos mian fabelon.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

-Onklo Adalberto-

Domok

Domok

